



TEA-BULTENO

18^A JARO - N^o 127

SEPTEMBRO - OKTOBRO

N. 9-10/2015

Feliĉon oni akiras, kiam tio kion oni pensas, tio kion oni diras kaj tio kion oni faras, inter si harmonias.
Gandhi Mohandas Karamchad (1869-1948)

Karaj Gelegantoj,

Septembras: la unuaj plantaj folioj flaviĝas kaj plumece surteriĝas. Baldaŭ nia Karsto surmetos sian belan aŭtunan veston, ornamitan per ĉiuj nuancoj de la plej varmaj ĉielarkaj koloroj: flavo, oranĝo, ruĝo. Temperaturo iĝos pli eltenebla, kio instigos nin al belaj promenadoj sur la padoj de la triesta altebenaĵo. Ne finiĝis la feriadperiodo, tial do ankaŭ dum ĉi du monatoj eblos ĝui vizitojn al kongresoj kaj renkontiĝoj, en la belaj urboj de nia mondo.

Tamen en Triesto, oni jam devas ekpensi pri laboro kaj agado por la plua disvastigo de nia lingvo. Do, tial malfermiĝos **vendrede la 4^{an} de septembro ekde la 19^a horo** la pordoj de la TEA-sidejo: ni atendas vin, pretajn rakonti pri viaj dumsomeraj spertoj en la Esperanto-lando, ĉar certe vi ĉeestis unu el la multnombraj aranĝoj okazintaj tra la mondo, ĉu ne?

Antaŭ ol vin aŭskulti, parolos iomete mi pri miaj travivaĵoj dum la 100^a UK en Lillo!



Mia plej lasta kongreso estis tiu de 2007, en Jokohamo, Japanio. Do, tio estis antaŭ 8 jaroj. Kun neimagebla ĝojo mi pretigis valizon, stokis en ĝin librojn, donacojn, dokumentojn, filatelaĵojn, krom - kompreneble - vestaĵojn ks,

por alfronti malvarman, laŭ retaj prognozoj, temperaturo.

En Lillo mi, aŭ pli bone, ni tri triestaninoj - Edvige, Barbara kaj Elda - alvenis tri tagojn antaŭ la kongresa sabato, por iomete kun ĝi konatiĝi, antaŭsciante ke kutime tio ne eblas dum la UK-semajno. Pri ĝi mi estis leginta ĉefe en turisma gvidilo, kies komentoj kaj priskriboj evidentigis ke temas pri ĉarma urbo. Fotilo dekstramane, mapo maldekstramane, gvidlibro subbrake, dorsosako surŝultre, nazo alten: ĉio ĉi klare montris al lokanoj, ke jen tute tipaj turistoj!

En la malnova urboparto, tre bone renovigita, vere ĉio ŝajnis fotinda: la arkitekturo, nekutima al miaj okuloj, estis notinda. Ĉirkaŭ la mezepoka bazarplaco, nun dediĉita al *Charles de Gaulle*, gape ni admiris la belajn palacojn. Fascinas la flandra arkitekturo, kun tiuj fasadoj el brunruĝaj brikoj, alterne kun blankaj kolonoj, abunda je ornamaĵoj, delikataj dekoraĵoj, skulptaĵoj. I.a. tre impresis min la konstru-datoj: ekde la 17^a jarcento! En mia urbo tiaj mezepokaj domoj tute ne ekzistas!

Nekontesteble bela kaj eleganta estas la Malnova Borsso, konstruita en 1652, kiu servis kiel renkontiĝejo por negocistoj kaj komercistoj. Ene de ĝi ĉiun posttagmezon okazas bazaro pri malnovaj libroj, ĵurnaloj kaj poŝtkartoj. Mi ne perdis la ŝancon esplori, ĉu troveblas malnova poŝt-

karto pri Bulonjo-sur-maro, Esperante skribita. Bedaŭrinde mi ne povis daŭrigi la serĉadon, ĉar du triestaninoj forkondukis perforte min!

Kaj kion diri pri la preĝejoj? La plejparto estas gotikstila, ekde la komenco de la 14^a jc. Elegantaj kaj severaj, ili transdonas sentojn religiemajn. Buntan helecon donas al la grizaj muroj kaj kolonoj la lumo traprentranta tra la ĉiukoloraj vitraĵoj de la altaj fenestroj, artverkoj de famaj artistoj el la 14^a-16^a jarcentoj kiuj rakontas la vivon de Jesuo, de Sanktuloj, de la Di-Patrina, aŭ prezentas Bibliajn scenojn.

Okulfrapas, kiam oni vagadas tra la urbo, la du belaj kaj imponaj belfridoj. Ho, mi forgesis diri al vi ke mi lernis novan terminon en Esperanto: 'Belfrido'! Ĉu vi scias, kion ĝi signifas? Temas pri *konstruaĵo en kiu troviĝas gvatejo kun sonorilo, ofte kariljono. La vorto 'Belfrido' devenas de la malnova franca vorto "berfrei", nun "beffroi". Origine belfrido estis gardoturo por sin protekti kontraŭ malamikaj atakoj.* (el Vikipedio). La urbodoma 'belfrido' altas 104 metrojn kaj estis konstruita en 1927: ĝi bele aspektas pro sia miksitaj arkitekturo, tiu flandra, ruĝbrika, kaj tiu moderna, betona.

Sed nun ek al Kongres', jam temp' està!

Jen la kongresejo *Lille Grand Palais*, tute moderna konstruaĵo troviĝanta en la kvartalo *Euralille*, je kvaronhora promenado de nia hotelo. Mi

eniras kaj tuj speciala Esperanto-etoso kaptas min. Mi ne plu konas miajn kunulinojn, la okuloj kuradas de unu homo al alia, por ekvidi malnovan amik/in/on sed mi devas bremsi mian ekfrenezigon, por pensi preni la kongresan dokumentaron.

Jen tie la vico por numeroj 2222 (mia nevino) kaj 2223: *dankon, dankon! Ĉio enordas en mia sako!* Tuja elpreno de la kongresa libro kaj fulma trafolumado por mense prepariĝi al multnombraj prelegoj, kunvenoj, diskutoj, teatraĵoj, koncertoj, okazintaj ne nur en la kongresejo sed ankaŭ aliloke en la urbo. Jen imitinda ekzemplo de malferma kongreso!

La sabata programo komenciĝas per la Movada Foiro: iom da tumulto dum la preparlaboroj, tamen akurate je la 19^a horo ĉiuj reprezentantoj de la diversaj asocioj (entute pli ol 100!) staras malantaŭ sia tableto, sur kiu bele ordigita kuŝas alloga materialo. Ankaŭ mi tie, kiel prezidanto de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista) kune kun s-ro Bert Boon, iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio, kun kiu unuafoje mi renkontiĝas. Estas bele finfine ekvidi amikon konatan nur tra retmesaĝoj. La reciproka simpatiem, vibranta en la dratoj de niaj komputiloj, aperis ankaŭ kiam ni estis unu fronte al la alia, kio impulsis al forta ĉirkaŭbrakumo. Perfekta fundamento por estonta kunlaborado!

Ĉu vere pasis antaŭ la tableto ĉiu el pli ol 2500 kongresanoj? Certe ne, sed tamen en la foirejo svarmis amaso da esperantistoj, kiuj ŝajnis esti tute interesitaj pri tiu varia mozaike da Esperanto-kulturaj eroj. Plej probable, neni, samkiel mi, havis tempon viziti la tie ĉeestantajn asociojn, kvankam pli malpli ĉiuj havis helpanton. Dum la 2-hora "deĵorado" estis kun mi alia esperantisto-filatelista, kiun mi ekkonis dum la Montpeliera UK (1998): s-ro Jean Pierre Ducloyer kiu dum tiu jam fora kongreso pretigis belegan ekspozicion pri Esperanto, pere de poŝtmarkoj, stampoj, glumarkoj, kartoĵoj ks. Konklude, fruktodona, sukcesa kaj interesa tiu Movada Foiro, nepre daŭrigenda.

Kaj nun la kulmina momento: la kongresa Malfermo! Grava novaĵo: unuafoje en la UK-historio ĝi estis samtempe sekvebla per reta elsendo, tutmonde. Kortuŝo kaptis ĉiujn kiam eniris la salonon d-ro inĝ. Louis-Christoph Zaleski-Zamenhof: li ĉi-jare festis en januaro sian 90-jariĝon. Fine de sia parolado, li diris: "... (la ĉi-jara) Kongreso, ... por mi, la "Nepo", tamen maljunulo, eble estos la lasta kiun mi partoprenos. Tial, la taskon kaj honoron reprezentati tiuokaze la Zamenhofan familion mi transdonas al miaj filinoj, do la "Pranepinoj". ... La pli aĝa, Hanna, loĝanta en

Filadelfio, postvenos min en la okcidenta terglobduono, dum la pli juna, (d-rino Margareta), kiun mi havas la plezuron prezenti al vi ĉi tie, faros tion oriente de Atlantiko". Do, la torĉo estis publike tiel transdonita!

Okdek estis la landoj reprezentitaj en la 100^a UK, tial samkvanton da salutoj aŭdis la ĉeestantaro: ankaŭ tio ĉi estis rekorda!

Dum la semajno, kurado de unu salono al alia, vizito de la libroservo, oftaj haltoj por salutaj, babili, amikiĝi, komenti kun novaj kaj malnovaj geamikoj, partopreno en ekskursoj al Bruges kaj al Bulonjo-sur-mar, kie ni itinerris laŭ la spuroj de nia Ludoviko. Ankaŭ ĉi tio vekis en ni emocijn, tamen certe emocijn pli malgrandan ol tiun spertitan de Zamenhof, kiam - en tiu sama teatro kie post 110 jaroj ankaŭ ni, homoj el la 21^a jc, sidis - li antaŭ salono plena je 668 esperantistoj, ekigis sian faman paroladon:

"Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj el la granda tutmonda homa familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el la plej diversaj regnoj de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn pro la nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas. ...

Sankta estas por ni la hodiaŭa tago. Modesta estas nia kunveno; la mondo ekstera ne multe scias pri ĝi, kaj la vortoj, kiuj estas parolataj en nia kunveno, ne flugos telegrafe al ĉiuj urboj kaj urbetoj de la mondo; ne kunvenis regnestroj, nek ministroj, por ŝanĝi la politikan karton de la mondo, ne brilas luksaj vestoj kaj multego da imponantaj ordenoj en nia salono, ne bruas pafitegoj ĉirkaŭ la modesta domo, en kiu ni troviĝas; sed tra la aero de nia salono flugas misteraj sonoj, sonoj tre mallaŭtaj, ne aŭdeblaj por la orelo, sed senteblaj por ĉiu animo sentema: ĝi estas la sono de io granda, kio nun naskiĝas. Tra la aero flugas misteraj fantomoj; la okuloj ilin ne vidas, sed la animo ilin sentas; ili estas imagoj de tempo estonta, de tempo tute nova. La fantomoj flugos en la mondon, korpigiĝos kaj potenciĝos, kaj niaj filoj kaj nepoj ilin vidos, ilin sentos kaj ĝuos. ..."

Jes, kara Majstro (kvankam vi neniam ŝatis ĉi titolon, permesu ke tiel mi nomu vin!), viaj elkoraj vortoj ne falis en la neniejon, ili estis plu kaj plu transigitaj tra la jaroj, ili neniam perdis sian valoron, kvankam foje oni iel emis kaŝi ilin, ĉar opiniataj ne kongruaj kun la modernaj homaj vivo kaj konceptoj. Sed homo restis la sama homo, kvankam de tiu granda evento por nia tuta movado pasis pli ol jarcento: la homo ja moderniĝis, multnombrega ilaro igis lian vivon pli facila, distancoj malpliigiĝis pro favoraj vojaĝebloj kaj rektaj interhomaj kontaktoj, de unu mondoparto al alia, eblas per komputiloj, saĝtelefonoj ks. Kaj sa-

me kiel iam homoj interdiskutas kaj interdisputas, same ekzistas riĉeguloj kaj mizeruloj, ne ĉe-
sas la militoj, eĉ pli akriĝas, etiko kaj moralo estas superfluaĵoj, rajtoj superas la devojn, tamen
- mi rediras - viaj vortoj ne falis en neniejon!

Kiam ni renkontiĝas por la jara evento, por la UK, tiu via sama emocio skuas nian animon, ni
kortuŝiĝas aŭskultante vian Nepon, ni fieras pri niaj eminentaj verkistoj, tradukistoj, sciencistoj
k.s., ni fieras ESTI ESPERANTISTOJ kaj ankoraŭ pretas "frate premi al si reciproke la manojn pro
la nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas".

Certe ni ŝanĝiĝis, tio estas la normala evoluado, sed fine nedubindas, ke sentemo, amo, soli-
dareco, bonvolemo, emo agadi por konstrui pli bone viveblan mondon, daŭre ardas en niaj ko-
roj, same kiel ĉe vi, kiam je la fino de via parolado eksentis la bezonon turniĝi al iu "nekonata
Forto" per la kortuŝa "Preĝo sub la verda standardo".

Kaj ne kredu, ke, kiam 2698 homoj el 80 landoj ekstaras por kanti la himnon "La Espero", ili ne
havas en sia eno la samajn emociojn, la samajn pensojn kiel vi rilate al la estonteco de nia
Esperanto en la realo de nia mondo! Koran dankon pro ĉio, kara Majstro!

Ĝis la 101^a UK en Nitra, Slovakio!

Via Elda

Eroj el UK

Dankon, Osmo! Dum la komitata konsido oni
aŭdis la anoncon de la Estraro de UEA pri la
nova Ĝenerala Direktoro: sukcesis Veronika
Poór el Hungario. Ankaŭ en la vendredo antaŭ
la komenco de UK, estis aŭskultitaj sinprezen-
toj de la kandidatoj al tiu tre grava posteno.

Ŝi komencos sian laboron kiel oficisto ekde la
unua de januaro 2016 kaj strikte kunlaboros
kun la nuna direktoro pri la transdono de la
taskoj. Oficiale ŝi enposteniĝos en marto, post
la emeritiĝo de Osmo Buller.

Estas tempo fine, paroli pri tiu kiu ekde 1985,
kun diversaj funkcioj, laboris en la centra Ofi-
cejo de UEA. Preskaŭ sian tutan laborperiodon
vivon li dediĉis al la plej grava instanco de la
Esperanto-movado. Unue li estis kongresa ofi-
cisto, poste iĝis Direktoro, kaj 1989-1992 Ĝe-
nerala Sekretario de UEA. Kiel Ĝenerala Direk-
toro, li laboris ekde 1996 ĝis nun, sed kun ĉ.
3-jara interrompo (2001-2004). En tiu vesto
multajn iniciatojn li entreprenis, sukcese kaj
rezultoplene, i.a. la "Gazetaraj Komunikoj"-jn,
kiuj ludis gravan rolon el la informada vidpun-
kto favore al la tuta esperantistaro. Pro ĝi,
sed ankaŭ pro lia firma, konstanta kaj sinde-
diĉa laboro en CO, li ricevis la titolon *Esperan-
tisto de la Jaro 2001*.

Plie, estis lia la ideo aranĝi en la Centra Ofi-
cejo la Malferman Tagon (ekde 1994), kiu jam
de longa tempo okazas dufoje en la jaro. Pri
la M.T. mi havas tre belajn rememorojn: mi
ne plu memoras, bedaŭrinde, en kiuj jaroj mi
ilin ĉeestis (NUR dufoje, denove bedaŭrinde!),
sed pli-malpli ĉirkaŭ la 1996^a aŭ 1997^a jaroj.
Post la unua ĉeesto mi estis tiom entuziasma,
ke el tiu aparte kontentiga travivaĵo mi eliris
artikolon por la TEA-Bulteno. Ĝi efikis tiom
pozitive sur kelkajn legantojn, ke ili mem volis
konstati, ĉu la aranĝo estas efektive vizitinda.
Sekve, atingis min sinceraj dank-vortoj de tiuj
partoprenintoj, pro la sperto ĝuita danke al
mia eta artikolo.

Kio dirita, estas nur parto el lia tuta agado,
kompreneble, sed ne estis mia intenco ĉi tie
skribi lian biografion. Estus bele tamen se iam
Osmo Buller mem verkus libron pri sia agado
kaj laborado ene de kaj por UEA. Post emerit-
iĝo li havos iom pli da tempo, ĉu?

Do, al la onta Ĝ.D. Veronika Poór iru miaj plej
varmaj bondeziroj de bona laboro, kaj al la
inta, al mia kara Osmo, ĝuoplenan kaj frukto-
donan emeritiĝon, kun espero revidi Vin inter
ni!

Rezultoj de la Belartaj Konkursoj

Poezio: 1^a Premio: Mao Zifu pro "Memoro";

2^a Premio: Jorge Camacho Cordón pro "Kredo";

3^a Premio: Paulo Sergio Viana pro "Rimoj ne-
perfektaj"; Honora Mencio: Jorge Camacho
Cordón pro "Ĉiu nova persono" kaj Ewa Gro-
chowska pro "Hajkoj".

Partoprenis 38 verkoj de 19 aŭtoroj el 15 landoj.

Prozo: 1^a Premio: ne aljuĝita;

2^a Premio: Nicola Ruggiero pro "Burĝonos la
migdalfloroj";

3^a Premio: Jesper Jacobsen pro "La tirkesto".

Partoprenis 22 verkoj de 13 aŭtoroj el 13 landoj.

Teatraĵoj: 1^a Premio: ne aljuĝita;

2^a Premio: Nicola Ruggiero pro "Adiaŭ al la
suno";

3^a Premio: Amin Naor pro "Bonaj intencoj".

Partoprenis 4 verkoj.

Eseo: 1^a Premio: ne aljuĝita;

2^a Premio: Nicola Ruggiero pro "Pri mondo
nokta, pleje mallogika";

3^a Premio: Davide Astori pro "Lingvoj, valoroj,
kulturoj, mondkonceptoj en dialogo".

Partoprenis 2 verkoj de 2 aŭtoroj el du landoj.

Infanlibro de la jaro:

Eldonejo Erroteta pro la libro "Usoa venis flu-
ge kaj sola kaj senvosta" de Patxi Zubizarre-
ta, tradukita de A. Arana.

Partoprenis 4 verkoj de 3 eldonejoj en tri lan-
doj.

**Gratulojn al la premiitoj, kaj precipe al Nicola
Ruggiero, kiu rikoltis belan bukedon da premioj!**

Laste trovitaj!

Dum konsultado de mia kolekto pri glumarkoj, kaptis mian atenton iu glumarko eldonita en 1935, okaze de la 27^a UK en Romo. Pri ĝi aperis la ĉi flanka glumarko, farita de la Itala Esperanto-Federacio, kies sidejo tiam estis en la prestiĝa Milana Galerio *Vittorio Emanuele*. En ĝi legeblas ankaŭ kelkaj informoj pri kongresaj: XI Somera Universitato, Literatura Vespere, Festo, Konkurso de naciaj kostumoj, Vojaĝo tra Italio, Kongresa Krozado al Afriko, Alpoj - Lagoj - Vesuvo - Oazo.



Do, vere densa programo, kaj kultura kaj turisma.

Por propagandi la krosadon, daŭrintan tutan semajnon, aperis 12 ilustritaj kartoj pri la diversaj havenoj, ĉe kiuj alboriĝis la ŝipo, plus glumarkoj en ses diversaj koloroj. "Esperantista krosado al Afriko, sur ŝipo 'Sinaia' - Napoli - Malta - Tripoli - Palermo - Genova" estas la surskribaĵo. Tamen sur ĝi troviĝas ankoraŭ io alia, tre interesa: la nomo de la desegnisto, Ludovico Rodo.

Tiu nomo ne estis al mi nekonata, sed malgraŭ ege streĉa fosado en mia memorujo, nenio kontentiga eliĝis. Kie serĉi? Nu, kun bedaŭro, mi devis rezigni. Rezignis mi, sed ne mia menso, kiu daŭre laboris, konsultis kaj esploris, tiel ke post du tagoj antaŭ miaj okuloj sin prezentis iu bildo: karto kun desegnita portreto de Zamenhof! Tuj mi elŝrankigis la albumon entenantan fotojn kaj kartojn pri Zamenhof. Jen ĝi! Kaj sur ĝi la subskribo: Ludovico Rodo! Bela sukceso, sed... kiu li estas, aŭ pli bone, estis? Nenio scieblas el la Enciklopedio de Esperanto, nenio el aliaj primovadaj libroj, restas nur esplorado en interreto...

Jen la rezulto:

Ludovic Rodo Pissaro (*Rodo estas mallongigo de Rodolphe*) naskiĝis en Parizo, novembro 1878, kaj mortis en 1952. Li estis la kvara filo de Julie Vellay (1839-1926) kaj la impresionista pentristo Camille Pissaro (1830-1903). Jam infanaĝe, kuraĝigita de sia patro, li komencis pentri kaj desegni. Dekses-jara, L. Pissaro eldonis sian unuan lignogravuraĵon por la anarkiisma ĵurnalo *Le Père Peinard*, fondita en 1889, kies ĉefaj temoj konsistis en atakoj al politika kaj ekonomia sistemo tiutempa. Kontraŭmilita kaj kontraŭklerika, la ĵurnalo denuncis la popolsubpremadon kaj kritikis la burĝan klason kaj la "eksploatantojn". En 1898



li translokiĝis al Parizo kaj havis sian atelieron en Montmartre, kie li konatiĝis kun tre famaj artistoj tiutempaj. En 1905 li unuafoje ekspoziciis ĉe *Salon des Indépendants* (Salono de sendependuloj), ekestinta en 1884 kun la celo eksponi la verkojn de artistoj kiuj postulas ian sendependecon en sia artesprimo.

Sed, kio pri lia esperantisteco? En la speciala historia numero "Vagante tra la francaj poŝtkartoj", unua kajero (eld. de Franca Esperantisto), verkita de Jean Amouroux, legeblas, ke li estis "aktiva membro de la Esperantista Vagabonda Klubo (EVK), fondita en 1907 kaj ariganta esperantajn artistojn, kiajn muzikistojn, pentristojn, desegnistojn k.a.", tial do supozeblas ke lia esperantistiĝo datiĝas jam de pli frue. La "Franca Esperantista Laborista Unuiĝo eldonis tri poŝtkartojn", de li desegnitajn, "por la Unua Laborista Esperantista



Kongreso en Parizo", 1914, ne okazinta pro la bone konata kaŭzo. Ĉu li estis ankaŭ SAT-ano? Pri tio ĉi mi ne trovis konfirmon.

Je la eksplodo de la 1^a mondmilito, li iris al Londono, kie kun la frato Lucien li establis la Grupon *Monarro* kun la intenco aligi artistojn inspiritajn de Impresionismo, organizi ekspoziciojn kaj diskonigi la francan Impresionismon en Anglujo. El la restado en Londono rezultis lia plej fruktodona artperiodo. Konsiderinda lia artproduktado, kiu ampleksis larĝan teknikan gamon, inkluzivantan oleon, temperan, akvarelan, guaŝan* pentradon, lignogravuradon, desegnadon kaj litografion.

Ne estas indikoj, en kiu jaro estis farita la apuda portreto de Zamenhof, certe post la 1917^a jaro.

Kiam li revenis en Francion, 1924, li dividis sian tempon inter Parizo kaj Les Andelys en Normandio. Malgraŭ siaj atingoj kiel artisto, L. R. Pissaro estas memorata eble pli pro sia grava kontribuo



al la art-historio. Fakte, dum 20 jaroj li katalogis la vivoverkojn de sia patro Camille kaj fine, en 1939, publikigis du-voluman libron, kiu ankoraŭ nun estas konsiderata la plej grava kaj konsista referenclibro pri la laboro de la pentristo Camille Pissaro.

Notoj: * guaŝo: Preparaĵo, farita el farboj akvigitaj kun gumo kaj mielo (NPIV - pĝ 411)

Amaranto

Kion mi pretigu ĉi-vespere? Ĉiutage la sama problemo! Mi rigardu en la provianta ŝranko, eble iu ideo sparkos en iu malluma cerbanguilo. Ho, kio estas tio? Nun mi rememoras: antaŭ kelkaj monatoj, pro scivolemo, mi ĝin aĉetis. Sed pri kio temas? Ho jes, amaranto! PIV-o, helpu min! **Amaranto:** *G. de unujaraj herboj kun verdaj, flavaj, oranĝaj aŭ ruĝaj floroj en longaj, staraj aŭ pendaj infloreskoj: ĉirkaŭ 60 specioj el la varmaj kaj mezvarmaj regionoj, pluraj pororname kultivataj.* **Vosta amaranto** *Sp. de amaranto el S-Ameriko, kultivata en la tropika zono por manĝeblaj semoj.* Nu, en la saketo estas etetaj semoj: eble temas pri tiu vosta! Fakte oni resendas al **kvinoo** (alia mistera nomo). Nur kelkaj informoj troviĝas sur la saketo: greno, fonto de forto manĝitaj de Aztekoj. Manĝebla kuirita en buljono, kune kun legomoj aŭ kiel garnajo.

Do, se ĝi estis efika sur la Aztekojn, certe ĝi estos energiodona ankaŭ por mi. Sed antaŭ ol ĝin manĝi, mi preferas iomete pli scii pri tiuj grajnetoj.

La semoj de amaranto, origina el Centra Ameriko, estas manĝeblaj kaj kutime kuireblaj kiel cerealoj. El ĝi ekzistas, kiel jam evidentigis NPIV-o, ĉirkaŭ 60 specioj sed el tiuj nur 3 (*A. cruentus*, *A. hypochonriacus* kaj *A. caudatus*) produktas manĝeblajn semojn. Aztekoj ilin nomis: la misteraj aŭ la diaj grajnoj.

Tiu planto venis al Eŭropo post la 18^a jc, sed ĝi estis uzita kiel ornamaĵo. Nur post pli ol du jarcentoj, pli precize en 1975, oni malkovris ĝiajn sanigajn nutropropraĵojn, sekve de publikigita libro far Usona Nacia Akademio de Sciencoj, en kiu oni priskribis ĝiajn karakterizojn. La vosta amaranto (*A. caudatus*) estas proteinoriĉa, ĝis 16 procentoj, kaj kompare kun cerealoj enhavas la duoblan kvanton da lizino, *unu el la 20 ĉefaj aminoacidoj de la proteinoj, esenca por la homo* (NPIV, paĝo 686). Krome ĝi entenas altajn dozojn da kalcio, fosforo, magnezio kaj fero. Fibroriĉa, ĝi

Kion ankoraŭ diri pri li? Multe li admiris L. L. Zamenhof-on: L. R. Pissaro prezentis lian pentritan portreton en arta ekspozicio, Rouen 1934, kaj lian buston en la Salono de Sendependuloj, Parize 1935. Tiuj ĉi verkoj estis postmorte donacitaj (1987) de Simone Glodeau al ges-roj L. kaj R. Grandiere. Simone Glodeau estis aktiva membro de SAT-Amikaro kune kun sia edzo Ludoviko, kiu antaŭe, en 1921, helpis al starigo de SAT dum la UK en Prago.

Kaj por fini, mi trovis la informon, ke multnombraj verkoj de la artisto estis venditaj ĉe aŭkcioj, inkluzive de la olepentraĵo "Café Parisien (Bal Tabarin)" kiun oni aĉetis en Londono, ĉe Christie's, junio 2011, por 36.514 \$.

bonfartige agas sur la digestan funkcion. Ĉar sen glutenoj, ĝi povas eniri ankaŭ la dieton de tiuj trafitaj de celiakia* morbo.

Kiel ĝin pretigi? Post lavado de la semoj uzotaj, boligi 250 gramojn da amaranto en 625 ml da salita akvo dum ĉ. 30 minutoj kaj lasi la semojn ripozi dum 5 minutoj. Sed atentu, ke tio estas la nura baza kuir-konsilo.

Ĉi-sube por vi bongusta preparaĵo taŭga por solvi la vespermanĝo-problemon.

Frituletoj el terpomoj kaj amaranto

Ingrediencoj por 6 personoj:

- 1 kg da ruĝaj terpomoj, boligitaj
- 100 g da mola fromaĝo
- 4 kuleroj da amaranto
- ½ taso da rostita amaranto
- 2 kirlitaj ovoĵ
- iom da haketita petroselo
- salo kaj pipro
- origano, timuso, bazilio

Preparado: boligu en iom salita akvo la amaranton, aldonante du akvo-partojn por unu parto el amaranto. Kuiru ĝin ĝis atingi densan kremkonsiston. Senŝeligu kaj dispremu la terpomojn, al kiuj vi aldonu la pecetigitan fromaĝon, la amaranton, unu ovon, petroselon, salon kaj pipron, kaj ĉion zorge miksu. Aldonu iom da faruno se la miksaĵo ŝajnas al vi tro mola. Poste lasu, ke ĝi malvarmiĝu. Doninte globformon al la buletoj, rapide trempu ilin en la iom salita, kirlita ovo. Rostu la semojn en iom da olivoleo kaj ilin spicu kun salo kaj pipro (laŭbezono), origano, timuso kaj basilio kaj per tiu miksaĵo kovru la buletojn (same kiel oni panerumas). Lasu ilin ripozi iom da tempo. Eblas aŭ friti la buletojn en bolanta olivoleo dum 2 minutoj ĉe ĉiu flanko aŭ, se oni preferas, metu ilin sur fornan platon kaj kuiru en forno je 180 gradoj da temperaturo dum 15-20 minutoj. Fine servu ilin kun saŭco el tomatoj aŭ kapsikoj. Bonan apetiton!

Noto: * celiakio - malsano aŭtoimuna konsistanta en netoleremo de gluteno ĉe la maldika intesto.

Pliaj detaloj troveblas rete, tial se vi emas pluesplori, oni povus kunmeti pli kompletan biografion, pri tiu ĉi elstara artisto/esperantisto, ĉefe koncerne lian Esperanto-engaĝiĝon.



Septembra Programo	
4-a, vendredo	19h00 - Malferma Tago de TEA: Bonvenon al vi ĉiuj!
8-a, mardo	17h30 - Konversacia rondo
11-a, vendredo	20h00 - Komuna legado de rakonto el la libro "Inter Amikoj" de la israela Amos Oz
13-a, dimanĉo	12h00 - Festo de Amikeco sur Monto Forno. Petu informojn pri kunirado!
15-a, mardo	17h30 - Konversacia rondo
18-a, vendredo	20h00 - Trafoliumado de la "Historio de la Esperanta Literaturo", verko de C. Minnaja kaj G.Silfer
22-a, mardo	17h30 - Konversacia rondo
25-a, vendredo	20h00 - Esperanto-filmoj de UEA
29-a, mardo	17h30 - Konversacia rondo
Oktoobra Programo	
2-a, vendredo	20h00 - Legado de la poeziaĵoj tradukitaj de la triesta dialekto al Esperanto
6-a, mardo	17h30 - Starto de unuagrada kurso: prezento de la lingvo kaj enskribiĝoj
9-a, vendredo	Sidejo fermita - Alp-Adria Konferenco en Opatija de la 8^a ĝis la 11^a
13-a, mardo	17h30 - Kursoj de Esperanto
16-a, vendredo	20h00 - Ni esploru la malnovajn Esperanto-revuojn
20-a, mardo	17h30 - Kursoj de Esperanto
23-a, vendredo	20h00 - Ĉu ni lernu novajn esperantajn vortojn?
27-a, mardo	17h30 - Kursoj de Esperanto
30-a, vendredo	20h00 - Ni ludu per vortoj en esperanto (<i>L'Esperanto—1989</i>)



KEA varme invitas la tutmondajn geesperantistojn partopreni en la plej grava E-evento en Kubo. Pli ol 150 lokaj esperantistoj el diversaj urboj bonvenigos ilin!

La tre interesa temo "Lingvoj kaj kulturoj: identeco en diverseco" estos diskutata en la Havana sidejo de la Unuiĝo de Arkitektoj kaj Konstruistoj de Kubo, organizaĵo kun kiu KEA de kelkaj jaroj tenas kunlaborajn rilatojn.

Jen ligilo al la Kongresa Bulteno: dl.dropboxusercontent.com/u/1107821/6kongreso_kea_kongresa_bulteno.pdf

18^a Esperanto-Konferenco de Alp-Adrio Opatija - Kroatio 9-11 de Oktobro 2015



Konferencejo:
Hotelo OPATIJA
Gortanov trg 2/1, OPATIJA
Temo: Adriatika maro, Maro de Mezeŭropo



Vendredon, la 09^{an} de Oktobro

ekde la 10^a en la konferencejo, akcepto de partoprenantoj kaj kvitigoj de aliĝkotiĝoj

18-20 Vespermanĝo en la hotelo (mendebla jam en la aliĝilo)

20-22 Interkona vespero

Sabaton, la 10^{an} de Oktobro

08-09 Akcepto de partoprenantoj kaj kvitigoj de aliĝkotiĝoj en la konferencejo

09-11 Oficiala malfermo de la 18^a Alp-Adria Konferenco

Salutoj de grupaj reprezentantoj

Prelego pri la konferenca temo: Edviĝe Ackermann

13-14 Tagmanĝo

15-18 Trarigardo de la urbo kaj....? (*bezonas taŭgaj ŝuoj*)

18-19 Komuna vespermanĝo (*gastejo anoncota*)

20-22 Kulturaj programoj (*anoncotaj*)

Dimanĉon, la 11^{an} de Oktobro

09-10 Fermo de la 18^a Alp-Adria Konferenco
Ekskurso – laŭ vetera kondiĉo

10-14 Foriro de partoprenantoj kaj "ĝis re-14-15 vido".

Pliaj informoj kaj aliĝilo troveblas ĉe:

www.esperanto.hr/agado_alp_adrio_2015.htm

82^a Itala Kongreso de Esperanto en San Benedetto del Tronto (AP)

La 22^{an} de aŭgusto 2015 ĉiuj korespondiĝoj, transdonitaj al la poŝta giĉeto deĵoranta en la kongresejo, surhavis la oficialan stampon. Por la okazo estis ankaŭ eldonitaj du diversaj poŝtkartoj, kun belaj bildoj pri la kongresa urbeto.



BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com

Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste

Kunventagoj: marde 17-20; vendrede 19-21

Tel: (+39) 345 2490291 - 040 350093; 339 2226936

Banka Konto: Unicredito—IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439

Retoj: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it

Asociaj ttt-ejoj: www.tea1906.altervista.org;

www.karstajtagoj.altervista.org